




tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



Atendas vin
IJK en
Ĉeĥujo. Venu
al Liberec
por festi kaj
diskuti pri
liberec'!

**120 Esperanto-
kursanoj en
Burundo**

**Nord-Amerika
Somera Kursaro
de Espersanto
40-jariĝos**

**Raporto pri
la pasinta
(eble lasta) IS**



*Karaj legantoj!
Jen jam la antaŭ-
lasta numero de
TEJO Tutmonde sub
mia redaktado. Mi
esperas ke vi ĝuos
ĝin.*

*Kiam ĉi tiu nu-
mero estas sendata
al la presejo, anko-
raŭ ne estas decid-
ite, kiu redaktos la
gazeton post mi, tiel
ke vi tion ekscios*

*nur en la sekva numero. Tiam atendos
vin intervjuo kun la sekva redaktisto.*

*Kvankam la numero estas 20-paĝa
(ofte TT estas nur 16-paĝa), estis mal-
facile kolekti sufiĉe da materialo por ĉi
tiu numero. Krom du kontribuoj el Bu-
rundo ne estis iuj ajn kontribuoj de
TEJO-membroj. Finfine mi sukcesis
pleni la numeron nur ĉar mi republik-
igis longan raporton pri la IS (Internacia
Seminario), kiu antaŭe aperis sur la
retpaĝaro de la Ĉeĥa Esperanto-Junul-
aro, kaj ĉar mi publikigis alvokojn al du
Esperanto-renkontiĝoj ne tute junularaj
(kvankam ja tre taŭgaj por junuloj): KEF
(Kultura Esperanto-Festivalo) en Dan-*

*ujo, kaj NASK (Nord-Amerika Somera
Kursaro) en Usono.*

*Mi do alvokas ĉiujn aktivajn TEJO-
membrojn foje kontribui al TT per
raportoj pri Esperanto-aktivado kaj pri
Esperanto-renkontiĝoj, kaj per pri-
movadaj ideoj. Kiam vi legas ĉi tiujn
liniojn, jam estas tempo por verki kon-
tribuojn al la unua numero de la sekva
redaktisto, kaj mi esperas ke li ne tuj
havos problemon kun la materialkvanto.*

*Ĝuu la legadon!
Marcos*

Enhavo

IJK atendas vin	3-5
Rubriko Esperanto en Interreto	5-6
Rubriko TEJO-membroj	6
Kultura Esperanto-Festivalo (KEF)	7-8
Novaj UEA-ekzamenoj	8
Raporto pri la pasinta Internacia Seminario en Germanujo	9-15
Kalendaro de Esperanto-aranĝoj	16-17
Esperantokursoj en Rumonge, Burundo	17-18
Pri Pasporta Servo	19
Nord-Amerika Somera Kursaro festos sian 40an jaron!	20

Limdato por 2009:4 – 15-a de Julio 2009!

*TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas
ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin.*

*Kontribuojn sendu rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-
dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Königwinterer Straße 204,
53227 Bonn, Germanujo. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!***

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

*Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanujo). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al:
TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: officejo@tejo.org. Presado:
SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne
respondekas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.***

IJK atendas vin

Certe vi scias kio estas IJK, la Internacia Junulara Kongreso. Verŝajne multaj inter vi ĝin partoprenis. Tamen kion vere vi scias pri la kongreso? Kion pli multe ol en kiu lando ĝi aktuale okazos kaj kiel aspektas la kotiztabelo?

Unue, kiam mi sidis por verki la artikolon, mi kontrolis min mem. Jes, la historio komenciĝis en 1938 en Nederlando. Tion mi sciis. Kie ekzakte mi ne memoris. En proksimeco de iu urbo. Mi forgesis ankaŭ la nomojn de la iniciatintoj, la geedza paro de instruistoj, kiu ne tiel pri la junulara, sed pri la skolta movado okupiĝis. Ion iam mi legis pri tio. Mi memoras ankaŭ, ke signifo de la mallongigo estis alia. Ŝajnas estis Internacia Junulara Kunveno, ne Kongreso. La nunan nomon IJK ricevis nur post la milito. Jen ĉio, kion mi scias.

Ne multe, fakte. Ĉu mi devas scii pli? Kion vi pensas? Eble... Eble por verki artikolon pri la IJK, aŭ se iu ekstermovada amiko hazarde demandus min pri la historio. Sed ĉu fakte mi devas? Mi scias la daton de naskiĝo kaj morto de la majstro, la pioniran historion ekde 1887 kiam aperis la Unua Libro ĝis la unua mondmilito, enhavon de preskaŭ ĉiuj paroladoj de Zamenhof. Kiu vere interesiĝas pri la historio de la kongreso junulara? Bona demando.

Klare. Mia tasko ne estis verki pri la historio, sed pri la IJK. Almenaŭ jam ni scias, kiam la unua okazis. Pli malpli. La kongreso havas ankaŭ aliajn flankojn. Inter alie TEJOn, la landajn sekciojn, LKK-on!... Certe iom vi aŭdis pri tio. Ankaŭ mi. Sed tamen! Kial pri tio ni



interesiĝu? Pri la strukturoj, ligoj, interrilatoj ktp sciu la prezidantoj, la prezidantinoj kaj la estraroj. Ili prenis sur sin ian respondecon, ilia do, ne nia tasko, ĉu?

Se pri la IJK temas, fakte gravas TEJO kaj la LKK. Kion faras unu kaj la alia? Ĉu gravas? Gravas ja ke la kongreso okazu, ĉu? Kun la postenoj ligiĝas iaj vizaĝoj. Parton de ili ni konas, parton ne. Tiu aŭ tiu ĉi troveblas en la listo de niaj geamikoj. Sed pri kiu problemoj ni parolas? Kun la vizaĝo nekonata ĉiam oni povas renkontiĝi kaj ekamikiĝi. Ekzemple ĝuste dum la IJK. En la trinkejo, kial ne? Eble ne kun ĉiuj, ĉar tiuj de la LKK iom strangas. Speciala speco de homo. Anstataŭ sidi en la trinkejo kaj gaje babili ili kuras de loko al loko, konstante ien rapidas kaj en iliaj okuloj videblas maltrankvileco, neklaraj emocioj, eĉ donacitan bieron ofte ili rifuzas kun respondo: momenton, ne nun, poste. Bone! Se ili ne deziras bieron, ne estas nia problemoj. Gravus bona etoso kaj ja ne nur ili venis al la IJK ĝin ĝui. La nova amikeco ne estas leporo, ne forkuros. Se ne dum la kongreso certe iam en Esperantujo. La vivo ja ne finiĝas!

La IJK. Kion vere ni scias pri ĝi? Pri la longaj antaŭpreparoj, laboroj dum ĝia daŭro, pri la homoj, kiuj elrevis ĝin organizi kaj pri ilia kvazaŭ ebria laco en danco kun balailo post ĉio tio, kiam oni devas redoni la lokojn purajn? Kion ni

scias? Facilas opinii. Diri: pli malpli bona, bonega, fuŝa. Ofte tion mi aŭdas. Malpli facilas tamen nenion diri, sed reagi, kiam aperas bezono. Helpi al tiuj pli malpli konataj vizaĝoj de la LKK, ke ili ne sentu sin viktimoj de siaj revoj, ke ili sidu, iom ripozu.

En la alia artikolo pri IJK (vidu la antaŭan numeron de TT) mi skribis, ke la kongreson ne specialistoj de la turismo organizas, sed amatoroj plenaj de flamo. Multaj el ili tiel grandan aranĝon organizas la unuan fojon en la vivo. Kiu memoras pri tio dum la plena de intelekta brilumado momento de plendoj? Kiu el inter tiuj, kiuj kritikas kaj parolas pri fuŝaĵoj ion ajn iam lerte organizis? Kiu?

Kompreneble - tion mi devas skribi, ĉar eble la artikolon legas novulo ĵus ekzercanta la lingvon – la kongreso apartenas al la plej interesaj renkontiĝoj de la junularo esperantista. Jes, kreu al ĉi tiuj vortoj. Ne temas ja pri ia ordinara kolektiĝo de junularo, sed pri la semajnon daŭranta mojosa festo somera. Sendube! La prelegoj, prezentadoj, ekskursoj, koncertoj, dancado, diboĉado... Dum la kongreso ne eblas enuiĝi. Multe da ĝojo, feliĉo kaj eĉ la intimaj aventuroj. Mi vidis ☺ Kaj se ne la matena kaj taga programo vin kaptos, la vespera kaj nokta malkovros antaŭ vi sencon aparteni al la esperantista kulturo. Tion scias ĉiu, kiu iam ajn la IJK-on partoprenis. Ne ligu do la eventon kun la balailo, kara novulo ☺ Nek pensu, nek demandu! Aliĝu! Tuj!!! Konformaj ligiloj fine de la artikolo ☺

Ĉi-jara IJK estos multflanke interesa kaj unika. Ĝi havos sian unuan fojon duoblan: Unue, ĉar tiu evento ankoraŭ neniam en Ĉeĥujo okazis, due ĉar la organizantoj ne estas lokaj sed

internaciaj. Apud la unuopuloj de diversaj landoj do la LKK-on formas kune aktivuloj de ĈEJ, GEJ kaj PEJ (Ĉeĥa, Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj). Neniam pli frue tio okazis. Klare, la 59-an IJK-on en Svedujo ne SEJU, sed la internacia teamo de TEJO organizis. Temas tamen pri du malsamaj aferoj. Se vi havas problemon tion distingi demandu vian prezidanton, prezidant-inon, la estraranojn de via landa organizo. Ja pri tio ili devas orientiĝi ☺

Tiu kuna agado havas siajn plusojn kaj minusojn. Valora certe estas kuraĝa paŝo en la internaciigan evoluon de la junulara movado. Tion ni bezonas. Eĉ urĝe! La movado malfortas, en la delikata esprimo ne vere progresas, venis do tempo stari unu apud la alia, kune labori, serĉi novajn ideojn, spertojn, simple: iri antaŭen! Ne gravas, fakte neniam gravis, kiu el ni kie naskiĝis. Do se kune ni kapablas tosti kial ne aĝi kune? La minusoj troviĝas en ankoraŭ modestaj spertoj pri tiu ĉi speco de kunlaboro. Plejmulto okazas ja en la reto, ne sur la reala batalkampo, kie la homoj povas integriĝi kaj bone ekkoni unu la aliajn. Sed valoras riski. De tio dependas fakte la sorto de nia movado, ke ni serĉadu ion novan kaj pli interesan ol ĝis nun ni atingis.

La finaj konkludoj? Nek vere pri la historio, pri la lokaj strukturoj de TEJO,

Ĝis la kvina de Aprilo jam aliĝis 257 partoprenontoj el 36 landoj al la ĉi-jara IJK. Listo de aliĝintoj troviĝas ĉe ijk.esperanto.cz/eo/Aligxintoj.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, ne hezitu plu: Aliĝu ĉe tejo.org/ijk !

nek pri la organizaj aferoj mi skribis. Iom eble. Sed por scii pli multe simple interesiĝu pri la temo. Estu specialisto, kiu parolas pri aŭto konscia, kiel funkcias la motoro. Se mankas informoj en la reto, serĉu ilin en alia fonto kaj plenumu la mankon por ke la aliaj informiĝu pli facile. En Vikipedio, ekzemple. Tion, kio estas en nia kulturo, kreas ni. Ne forgesu. Kaj se vi venos al Liberec, kunkreu la renkontiĝon, egale ĉu rabaton vi ricevos aŭ ne. Ĉiam ni parolas pri amikeco en la movado. Kun amikeco estas same kiel kun amo. Ĝi funkcias nur tiam kiam ĝi estas ambaŭdirekta. Ne observu do dum la IJK, sed helpu, por ke la unuaj spertoj de la internacia LKK ne fariĝu amaraj. Pri tio petas mi, la juna maljunulo, kiu ion jam scias pri tio. Kaj aliĝu al semajna somera festo, se ankoraŭ vi ne aliĝis:

Aliĝu ĉe tejo.org/ijk.

Detalojn pri la kongreso vi trovos

ankaŭ en la Vikipedio en Esperanto:
eo.wikipedia.org/wiki/IJK_2009

Irek Bobrzak, Polujo

PS. La Internacia Junulara Kongreso estas la dua en listo de similaj junularaj progres-aktivecoj en ĉi-jubilea jaro de 150-a datreveno de la majstro-naskiĝo. Antaŭ ĝi jam okazas Somera Esperanto-Studado (SES), denove en Modrá-Harmonia (Slovakujo). La 65-an IJK-on sekvas la 94-a UK kun ankaŭ alia ol ĝis nun Junulara Programo, dum kiu interalie eblos ĝui la unuan eŭropan koncerton de la brazila Esperanto-rokbando Supernova, kaj novjare JES, kuna entrepreno de la IS- kaj AS-organizantoj. Estu proksime de la eventoj. Helpu ilin kunkrei!

¹ LKK = Loka Kongresa Komitato (organizantaro de Esperanta renkontiĝo, ekzemple de la IJK)

Esperanto en Interreto

Jen interesaj retpaĝaroj Esperant-lingvaj. Vi povas kontribui al ĉi tiu rubriko per prezentado de Esperantlingva retpaĝaro aŭ alia reta Esperantaĵo.

RememberTheMilk.com ("memoru la lakton") estas reta ilo por organiziĝi – do por krei listojn de farenadoj kun limdatoj, alarmoj kaj simile. Oni povas havigi ilin al kunlaborantoj aŭ familianoj, aldoni RSS-fluon de taskoj al ies RSS-ilo, aŭ uzi ĝin kune kun *Google Calendar*,

iPhone, ktp.

RememberTheMilk.com havas interalie Esperantlingvan interfacon, pro traduko de Tim Morley.

Edukado.net estas altkvalita retpaĝaro pri instruado de Esperanto. Ĝi celas ĉefe kunlaboradon inter Esperanto-instruistoj, sed estas ankaŭ helpilo por memlernantoj. En ĝi troveblas plej diversaj instrumaterialoj (tekstoj, bildoj, sonmaterialo) por ĉianivelaj kursoj,

katalogo kun detalaj recenzoj de Esperanto-lernolibroj, specimenoj de internaciaj kaj naciaj Esperanto-ekzamenoj, anoncoj kaj legejo pri eventoj en

Esperantujo, listoj de Esperanto-lernejoj kaj kursgvidantoj, koresponda servo, forumo ktp.

Rubriko TEJO-membroj

Jen denove kontribuo al la rubriko *TEJO-membroj*. En ĉi tiu rubriko ĉiu TEJO-membro povas prezenti sin per respondoj al la ĉi-subaj demandoj kaj per foto. Do, ne hezitu!

- *Kiel vi nomiĝas?*

NTAKIRUTIMANA Justin

- *De kiu lando vi venas, kaj kie vi nun loĝas?*

Mi naskiĝis en Burundo, en la suda parto de nia lando (provinco Bururi). Mi nun loĝas en mia naskiĝloko.

- *Kiom da jaroj vi havas?*

Mi estas 20-jaraĝa.

- *Kiel vi esperantiĝis?*

Mi eklernis Esperanton en 2003 per mia frato s-ro Jérémie. Tiam, li ne havis sufiĉan tempon por zorgi pri mi. Mi nur de li sekvis du lecionojn el la instrulibro *Metodo Zagreba*. Mia frato estis lernanto kaj ne lernis en proksima regiono, pro tio li ne havis sufiĉe da tempo por mi kaj lasis al mi sian lernolibron. Tiam mi daŭrigis lerni sole kaj en la jaro 2004 mi fondis mian unuan klubon nomitan "Unuiĝo". En la jaro 2005 ni partoprenis en seminario gvidita de la sinjorino Tereza Kaptista (serba esperantistino); tiam mi ricevis mian unuan diplomon kaj vidis ke Esperanto reale ekzistas.



Nun mi estas instruisto kaj mi instruas Esperanton al tri kluboj, kaj mi estas vic-prezidanto de centra klubo de Rumonge.

- *Kiujn ŝatokupojn vi havas?*

Esperanto, vojaĝi, legi, korespondi kun multaj amikoj el ĉiuj anguloj de la mondo, verki artikolojn, piedpilki kaj instrui Esperanton

- *Kio estas via devizo?*

Nur faroj, ne al vortoj

Kultura Esperanto-Festivalo

La festivalo KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) denove okazos en Danujo. Ĉi-foje estos en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør/Elsinoro. La festivalo okazos de la 7a ĝis la 12a de Julio 2009.

Nun la 9an fojon junuloj en Nordio aranĝas la Kultureman Esperanto-Festivalon, ĝis nun ĝi estis organizita en Svedujo, Finnlando kaj Danujo. Ĝi estas festivalo kiu prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon.

KEF estas unika loko por la Esperanto-kulturo. Ĝi estas la loko kie Esperanto-artistoj povas renkonti aliajn artistojn. Ĝi ankaŭ estas la loko kie vi povas interkonektiĝi kun la abunda vivo de la Esperanto-kulturo kiel spektanto de la multaj koncertoj, teatraĵoj, kaj literaturaj prezentoj. Sed vi ankaŭ mem povas partopreni aktive en la multaj metiejoj. Interalie vi povas lerni poemi en Esperanto, partopreni dancatelieron, legi kaj fari komiksojn, ludi ludojn en Esperanto, ktp. Nur en KEF vi povas ekz. karaoketi en Esperanto, ne kun maŝino sed vive kun la artistoj mem, (se vi estas infano) partopreni la unuan rokbandon por infanoj aŭ fari la unuan cirkon en Esperanto!

Amaso da bonaj konataj Esperanto-artistoj distros. Jam nun ni scias ke venos: Ĵomart kaj Nataŝa, Martin Wiese kaj la Talpoj, Hotel Desperado, La Perdita Generacio, Pafklik kaj D.C. Inicials, kaj pluraj aliaj artistoj estos anoncigitaj en la hejmapaĝo. Dum ĉiu nokto Flo de Vinilkosmo estos diskejon kun dancmuziko nur en Esperanto. Cetere vi povas



spekti filmojn en Esperanto, kaj plene ĝui la plej grandan kultureman Esperanto-aranĝon.

La festivalo estas festivaleja en sia formo, tiusence ke oni loĝos modeste kaj tiamaniere la kostoj ne estas tiom altaj, kvankam Danujo estas unu el la plej multekostaj landoj en la mondo. Kompreneble eblas ankaŭ loĝi pli lukse en migroloĝejo aŭ en hotelo kontraŭ aldona kosto.

En la semajno tuj antaŭ KEF, en Danujo okazos la plej granda Rok-festivalo en Nordeŭropo – Roskilde-Festivalo. La dana Esperanto-junularo (DEJO) organizas senpagan esperantan

renkontiĝon dum la festivalo. Ĉiuj laboras 24 horojn en la DEJO-budo. Ĉiuj en 3 okhoraj periodoj. Dum la resto de la tempo vi povas festi kun la aliaj, aŭskulti koncertojn kaj eĉ gajni monon por partopreni KEF.

Vidu ĉe *kef.saluton.dk* pri pli da detaloj, la diversaj metiejoj kaj kotizo.

Kronborg, kastelo de Hamlet – Elsionoro, Danujo



Al KEF ankaŭ venas La Pafklik, kiu antaŭnelonge publikigis la unuan hiphopan albumon en Esperanto

Novaj UEA-ekzamenoj

Post plurjara kunlaboro, en kiu *edukado.net* havis gravan rolon, UEA lanĉis novan internacian ekzamen-sistemon de Esperanto, kiu konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo kaj difinas lingvokonajn normojn.

La novaj ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) nun estas ellaboritaj (el la 6 ekzistantaj) en niveloj B1, B2 kaj C1. La akreditigo kaj funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la ŝtate rekonataj fremdaj lingvoj kaj kadre de ties ekzamensistemo havas la samajn rajtojn kiel la aliaj fremdaj lingvoj. Plurmil kandidatoj estas testataj ĉiujare en la menciitaj niveloj en la tiel nomata dulingva (hungara-Esperanta) versio de la lingvaj ekzamenoj.

La fakto, ke la nova ekzameno konstruiĝis baze de la eŭropaj normoj, signifas, ke ties atestilon oni oficiale agnoskas kaj traktas kiel la aliajn lingvoekzamenajn diplomojn, akreditigitajn de ALTE. Mem la atestilo estas impona, lede kovrita dokumento, verkita en 4 lingvoj

(hungara, angla, germana kaj franca) kun la kompletiga internaĵo en Esperanto.

Ni esperas, ke la nova sistemo havos sukceson inter la esperantistoj kaj ties ekzamenojn trapasos multaj el inter ili, pruvante, ke valoros la investita laboro kaj tempo, kaj ke nia movado pretas je eŭroponivela mezuriĝo. Ni antaŭvidas 3 sesiojn en la sekvaj monatoj, momente ĉiujn en Eŭropo, sed la koncernuloj laboras pri tio, kiel la ekzameno povas esti okazigita ankaŭ en aliaj kontinentoj.

Edukado.net daŭre kunlaboros por la okazigo de la ekzamenoj kaj ene de kelkaj monatoj, kunlabore kun la budapeŝta centro funkciigos retan ekzamenon, kie la interesiĝantoj senpage povos testi sin antaŭ ol aliĝi al la ekzamenoj.

Dum IJK eblis ekzameniĝi novtype pri Esperanto, se aperos sufiĉe multaj interesatoj en unuopaj grupoj (niveloj B1, B2, C1). Se iu havas intereson, bv. kiel eble plej rapide skribi al ijk.ekzamenoj@esperanto.cz.

Laŭ informoj sur *edukado.net* kaj *tejo.org/ijk*

Raporto pri la Internacia Seminario 2008

La 52-a IS okazis inter la 27-a de decembro 2008 kaj la 3-a de januaro 2009 en la montara urbeto Biedenkopf en Germanujo. Partoprenis ĝin 138 gejunuloj el 24 landoj. Raportas Miroslav HRUŠKA el Ĉeĥujo.

KATASTROFO!

!NEKREDEBLA!

La lasta IS en Germanujo!

Okazis io, kion neniu atendis. Katastrofo. La 52-a Internacia Seminario estis la lasta Internacia Seminario. Jam ne plu. Kaj samtempe ne estos Ago-Semajno.

Damne, kio okazis? Kaj kio estos sekvan fojon? Plej kara Zamenhof! Tiu ĉi raportajo verŝajne klarigos, almenaŭ provos. Eble vi trovos eĉ respondon.

Do, serioze...

Enkonduko

En jaro 2008 mi partoprenis Internacian Junularan Kongreson en Hungarujo. Jam dum la aranĝo mi kaj aliaj gepartoprenantoj estis invitataj de georganizantoj de diversaj esperantaj aranĝoj. Ankaŭ de homoj de IS kaj AS. Tiam mi ankoraŭ ne definitivigis miajn pripensojn partopreni la AS-on en Slovakujo, ĉar samtempe mi eble preferis la ŝanĝon do Internacia Seminario. Ankaŭ mia nova amikino de Ĉeĥujo Bára invitis min tien. Ŝi partoprenis la antaŭan IS-on. Male Marek BLAHU` foje menciis ke li aliĝos al AS post unujara paŭzo, dum kiu li partoprenis IS-on.

La finan decidon pri Germanujo mi tamen devis ankoraŭ pridiskuti kun miaj gepatroj, sed ili jesis. Okazis eĉ io ne tiom atendita. Marek BLAHU` decidis ke li partoprenos IS-on, ĉar por li Slovakujo estus tro for de Belgujo, kie li estis ekstudonta dum 5 monatoj ekde Septembro. Aliĝis ankaŭ Vítek Miaurec.

Proksimiĝis decembro kaj Kristnasko kaj libera tempo kristnaska ferio kaj IS

Mi preparadis prelegon pri Ĉernobilo, ĉar la temo de IS estis "Katastrofoj..."

Ho, mi ne sciis, ke okazos kelkaj katastrofoj...

Antaŭ forveturo

La unua katastrofo venis semajnon antaŭ forveturo: Vítek skribis ret-mesaĝon, ke li ne povas partopreni IS-on! Tamen povas partopreni AS-on! Kion tio signifis? Ĉar ni volis uzi ne tro multe-kostan bileton *Feliĉa semajnfino* (*Schönes Wochenende*) kaj la bileto estis por 5 homoj por 35 eŭroj, tio signifis, ke ni devus pagi pli. Mi trovis la solvon: skribi anoncon al la diskutgrupo en Interreto pri IS, ke ni povas akcepti en nian grupon du homojn. Neniu respondis, sed bonŝance aperis interesiĝo de plia junulo el Ĉeĥujo. Stanislav `TOČEK aliĝis anstataŭ Vítek. Okazis, ke Marek simple dissendis invitilon al la ĈEJ-membraro per retpoŝto, kaj Standa reagis. Pri tio mi eksciis je la 23-a de decembro.



Ĉeĥaj IS-partoprenantoj

La vojaĝo

Laŭ la interkonsento kaj plano de komuna vojaĝo Marek BLAHUŠ alvenis vespere per trajno je la 26-a decembro en mian urbon kaj ni tiam samtempe revidis nin post 4 monatoj. Ni ankoraŭ veturis al mi hejmen, kie mi finis la pakadon. Sed ĉefe, ĉar alikaze ni devus atendi en la urbo du horojn, dum en la varma loĝejo ni povis pli trankvile diskuti la multajn novaĵojn. Post noktomezo mi forveturis kun Marek kaj mia patro al la stacidomo per aŭto. En la nokta atendejo mi neatendite renkontiĝis kun unu mia amiko, kiu ankaŭ emas vojaĝi kaj studi en fremdaj landoj. Mia patro same renkontis tie unu lerninton de lia lernejo (li estas instruisto), kaj sekve en tiu ĉi grupo de kvar vojaĝantoj ni provis enrajniĝi kaj esti en unu kupeo. Bedaŭrinde, la trajno estis sufiĉe plena kaj fine mi restis en kupeo nur kun Marek.

Sen halto ni veturas al Prago, kie el nia kupeo foriras unu viro kaj nia kupeo tiel iĝis pli libera. Kvankam ŝajnis, ke en la hungardevena vagono la kupeoj ne estas tiom luksaj, mi sukcesis ekdormi. En Ústí nad Labem ni eltrajniĝas. Estas la kvara horo matene, sed ni ne volas simple atendi – ni volas geokaŝadi (eo.wikipedia.org/wiki/Geocaching) kaj efektive dum tiu tempo trovas du kaŝ-ujojn. Poste ni revenas al la stacidomo, ĉar jam proksimiĝas la trajno de Prago al Cheb. En tiu trajno veturas la du aliaj kunvojaĝantoj Bára ZÁVODSKÁ kaj Standa ŠTOČEK. Laŭ la poŝmesaĝo ni trovas facile la ĝustan vagonon kaj Standa invitas nin en ilian kupeon. Ho, jam kupeo de ĉeĥaj fervojoj, do ne tiom bela kaj komforta.

Post la naŭa horo ni venis en Cheb, de kie ni forveturas jam per germana trajno

al Marktedwitz. La trajno ne veturas longe. De Marktedwitz ni veturis per vere rapida trajno, sed tre plena. Tamen al mi plaĉis, ĉar la teknologio de tiu ĉi trajno estis simila al ĉeĥa Pendolino (klinebla ŝranko)! Interesege! Per tiu ĉi trajno ni venis al Nürnberg, kie ni denove ŝanĝas la trajnon. Mi rimarkis eĉ la faman ICE (*Intercity-Express*), sed per tiu trajno ni ne rajtas veturi.

Ni jam eksidiĝis en nian trajnon al Frankfurt am Main kaj en tiu ĉi momento venis iu kaj salutis nin Esperante! Ĉar li ankoraŭ ne aĉetis bileton, Martin Sawitzki akompanas nin kaj ni fariĝas grupo de 5 homoj! Kaj de tiu ĉi momento ni ja ne povas krokodili, ĉar Martin ne komprenus. Al Frankfurt ni veturas longe kaj eĉ tra la urbo de la IS en la jaro 2007/2008 Würzburg. Post kvin horoj ni estas en Frankfurt. Apud la stacidomo estas unu kaŝujo, vere malgranda, tiel ke dum la serĉado diras al ni la gardisto de apuda hotelo, kie la kaŝujo estas.

De bela kaj granda stacidomo en Frankfurt am Main ni forveturas al Marburg. La trajno estas iomete malfruiĝinta, sed kiel diris la kontrolistoj, la konekta trajno el Marburg atendas. Ĝi vere atendis, kaj sur la perono staras multe da homoj, kaj iu demandas min en la angla lingvo. Finfine - la lasta trajno, kaj en la trajno jam plene da gesperantistoj. Ni babilas kaj konatiĝas kun Miranda de Aŭstralio kaj aliaj...

Unuaj impresoj

Ĉar la organizantoj scias, ke alie estus ĥaoso, ni povas tuj iri manĝi kaj nur poste ni konfirmos nian alveturon. Post bongusta vespermanĝo (mi povis elekti, kion mi volas) mi iras al la organizantoj

kaj pagas la kotizojn, aliĝas al TEJO ktp. Ĉiu ricevas la nomŝildon. Mi iras al mia ĉambro, kie en tiu ĉi momento estas nur Benny de Irlando. Iom poste venas ankaŭ du britoj. Tamen restas ankoraŭ du litoj liberaj.

Vespere estas interkona vespero kaj parolo de Felix kaj Rolf. Ŝajne estos multe da amuzo dum tuta semajno :-). Post la oficiala komenco estas koncerto. La unuan vesperon, fakte nokton, mi spektis la filmon "Marmota tago", gustumis germanan bieron kaj iris dormi ĉirkaŭ la tria horo. Post 5-6 horoj da dormo mi iris matenmanĝi. Kiel gajan humoron mi havis, kiam mi vidis tiom da diversaj manĝoj, fruktoj, cerealoj... Mi malrapide plenigas mian stomakon kaj diskutas kun aliaj vekiĝintoj...

Katastrofoj komenciĝas

Baldaŭ mi eksciis, ke matene mi ne povas atendi ajnan formalan programon, do mi iras al la ludejo kaj ludas tie kun aliaj homoj. Mi pensas, ke estis tiam kiam mi ekkonis la teruran katastrofan ludon, Mao! *Vi ne ludis dum kvin sekundoj! Ne estas via vico.* *Maĝ usta karto* Longe mi ne komprenis. Post la tagmanĝo jam estis vekaj preskaŭ ĉiuj, ĉar baldaŭ sekvas urba promonado. Dum ĝi ni iras laŭ la rivero al la urbocentro, kie estas bela ĉefa placo kun du interesaj monumentoj pri militoj. Ni pluiras al kastelo super la urbo, kie Marek, ĉar li kunhavas GPS-ilon, ekscias, ke ege proksime estas unu kaŝujo, kaj tiun parton de ni decidis tuj trovi. Sen problemoj nia unua kaŝujo ĉi tie en Biedenkopf. Post la malsupreniro de la kastelo ni disiras, kelkaj de ni volas kafejumi, kelkaj de ni jam estas tro frostigitaj de malvarmo. Tiun katastrofon, ke mi ofte bezonis varman lokon, mi dum

la tuta aranĝo solvadis facile mi volu: danki al la organizantoj, ke preskaŭ ĉiam funkciis saŭno, kie mi povis varmiĝi kaj ripozi.

Tamen ne nur katastrofoj

Vespere estis koncerto de Alejandro Cossavella. Dum tiu ĉi vespero okazis, fakte, ni diru, interesa **malkatastrofo**: Post noktomezo mi iris spekti la ĉeĥan filmon, *Bukedo*. Mi ĝuste jam estis elironta el mia ĉambro por spekti la filmon, sed en tiu momento venis nova homo en nian ĉambron. Mi salutas lin, sed tuj diras, ke mi ne havas tempon (*ĉar tempo kostas monon, dirus Jefim de Jalto :-)*) por ke ni parolu. Krome ŝajnas



La kartludo Mao. Eltrovu la regulojn!

al mi, ke ĉar li venis en malfrua nokto, li ŝajne deziras iri tuj dormi. Do, mi spektis la filmon (fakte jam la duan fojon, sed tio ne gravis al mi) kaj post ĝi iris dormi. Post la matenmanĝo mi decidis demandi al Rolf Fantom, kio estas tiu "Fantoma Faŭko". Li tuj diris, ke li havas por mi rolon, kaj mi devis elpensi kelkajn "taskojn" por la publiko de tiu teatraĵo. Miajn ideojn mi poste transskribis sur



Kiu volas iĝi milionulo?

grandajn paperojn. Feliĉa, ke mi partoprenos tiun amuzan programon, mi iris al ludejo. Mi ludas "Unu" kiam eniras la nova ĉambrano.

Li: "De kiu lando vi estas?"

Mi: "Mi estas de Ĉeĥujo."

Li: "Mi estas ankaŭ de Ĉeĥujo."

Mi: "Kio? He? Kio? Ke ni ne scias pri vi..."

Li: "Tio estas longa rakonto."

Mi: "Do, rakontu al mi."

Jam ĉeĥe ni prezentas nin, sed ĉefan vorton havas li. Ni parolas ĉeĥe kaj pro tio mi rapide ekscias, ke li nomiĝas Vlado, studas en Anglujo, partoprenis renkontiĝon de geuzantoj de *lernu!* (SES en Slovakujo), sed tiun ĉi aranĝon li ne planis partopreni. Tial li ne estis en la listo de aliĝintoj. Li aliĝis al alia renkontiĝo de esperantistoj en Germanujo, sed de familioj. Kiam li venis tien, li tre rapide decidis pagi ankoraŭ iom pli kaj anstataŭe vojaĝi al la IS.

Programeroj

Post tagmanĝo Marek organizis programon por ĉiuj, kiuj volis denove frostiĝi, ĉar la programo estis geokaŝado Marek

klarigis al ĉiuj la ludon kaj ni povis eliri. En la komenco estis multe da homoj kaj ni trovis unu vere facilan. Poste ni serĉis unu pli komplikan kaj dum tio kelkaj homoj jam decidis reveni al IS-ejo. Entute ni trovis tri lokajn kaŝujojn. Tiutempe okazis en la IS-ejo interreta diskuto kun organizantoj kaj partoprenantoj de la samtempaj Ago-Semajno kaj la Komuna Seminario (KS) en Japanujo.

Tiun vesperon okazis amuzega programo: "Kiu volas iĝi milionulo?" tiur ĉi faman ludon mi konis de Ĉeĥujo, sed neniam vidis en Esperanta versio. Pro tio, ke mi volis amuziĝi, mi ne aliĝis kiel ludanto, sed kiel spektanto... Ho, ne nur amuza ludo :-). Fakte venis denove **katastrofetoj** :-D Ĉiam kiam oni denove volis komenci la "dispaŝon" (elekti novan ludanton el la kandidatoj), necesis restarti la komputilojn - rezultiĝis teknikaj paŭzoj. Post tiu programero sekvis denove vesperaj ludoj, diskejo, (d)trinkado ktp...

Jam venis la antaŭlasta tago de la jaro 2008 por mi tio signifis prepari la reston de la prelego pri Ĉernobilo kun Marek al nia prelego pri la Ĉernobila **katastrofo** venis relative bona nombro de homoj. Mi parolis, kiel okazis la katastrofo, kia estas hodiaŭa situacio, kaj ĉar ni antaŭe estis en Ĉernobilo (ni vizitis ĝin en la jaro 2007), ni havis multe da fotoj de nia vizito pri komentoj zorgis Marek. Post la prelego homoj povis demandi... Mi kaj Marek poste decidis, ke ni iros en vendejon kaj poste serĉos ankoraŭ du lokajn kaŝujojn...

Vespere estis laŭ mia opinio la plej amuza programo: Skeĉaĵoj "Fantoma Faŭko". Kiel mi jam skribis, mi preparis paperojn kun taskoj por la publiko. Estis

kvar skeĉaĵoj kaj mi ĉiam havis iun taskon, ekz. "Insultu", "Krokodilu", "Ĵetu ŝuojn (tiu vere efikis :-))" ... Plej amuza skeĉo laŭ mia vidpunkto estis "Mi estas majstro pri nefekado". Poste venis ankoraŭ koncerto de "Inicialoj DC", sed la koncerto ne estis tiom interesa, do mi ludis ludojn, speciale homlupojn, trinkis, dancis, babilis...

LA LASTA TAGO DE LA JARO 2008!

Fakte mi ne scias, kion mi faru en la broŝuro estis nur "Libera loko" kaj "Jarkunsido de GEJ". Sed mi certe dormis posttagmeze almenaŭ du horojn, poste prepariĝis persone por longa nokto (sen fino? - ne, tio estis pasintjare dum Ago-Semajno). Kuiristoj de la junulargastejo preparis tiom multe da manĝaĵoj, picoj, lasanjoj, dolĉaĵoj... vere tiom multe da ili, ke mi forgesis ke mi tamen havas iun limon! **Katastrofo!** Mi estis tiom plena, ke mi unu horon ne povis danci. Sed fakte oni tiam ankoraŭ ne dancis tiom...

Proksimiĝis noktomezo, ni jam festis la

rusan kaj ukrainan novajn jarojn... Tuj en unuaj sekundoj ĉiuj brakumiĝas, kisiĝas kaj deziras reciproke feliĉan novan jaron... Mi kuras laŭ la plano eksteren por spekti urbajn kaj parte eĉ Esperantajn artfajraĵojn. Bonŝance almenaŭ mi kaj Marek kunportis jakojn, malkiel la knabinoj. Tial Marek dume varmigis Bára-n, kaj mi? Elina-n de Italujo... Ŝajne dum tiuj novjaraj noktoj homoj estas al si pli proksimaj kaj mi tiam iom proksimiĝis kun Elina... Estis al mi jam klare, kun kiu mi estos ĝis la momento, kiam iu de ni du devos forveturi.

Kaj nun pri tiu ĉefa **Katastrofo**: Tridek minutojn post noktomezo ni ĉiuj venis al la halo, kie ni antaŭe kutimis danci, kie okazadis koncertoj ktp... Sed ĉi-foje ni sidiĝis kaj spektis surprizan filmeton pri tio, ke ne estos plu la Ago-Semajno nek la Internacia Seminario, sed anstataŭe estos JES, kaj unuafoje en Polujo! Ĉu vi venos al JES? JES, mi venos al JES! Mojosega nomo de nova Esperanta aranĝo. Georganizantoj de Polujo kaj



Benio el Irlando gajnis la kostmkonkurson kun la temo *Katastrofoj*

Germanujo aranĝos sekvan jaron komunan renkontiĝon.

Poste mi ankoraŭ dancis kaj trinkis bieron kun Elina, matene diskutis ĉe teo kun Paŭlo kaj eble ĉirkaŭ la oka horo mi fine iris dormi...

Unuaj tagoj de la nova jaro

Antaŭtagmeze mi vekiĝis, matenmanĝis kaj poste partoprenis la "Novjara migradon" simple promenon ĉirkaŭ la urbo. La promeno estis ege interesa kaj mi konatiĝis kun unu juna esperantistino de Krimeo kaj ni diskutis pri Ukrainujo, Krimeo... Mi promesis, ke ni poste spektos fotojn de Krimeo, ĉar mi havis mian lumdiskon kun fotoj.

Posttagmeze mi partoprenis por mi vere interesan prelegon: "La rapidtrajnoj Intercity-Express en Germanujo". Mi kiel trajnfrezulo estis gajega :-)

"Ĉu vi pretas, ĉu vi pretas, ĉu vi pretas por la veno de Dolĉamar?" JES, mi pretas! La unuan vesperon en la jaro 2009 ni povis aŭskulti koncerton de la fama Dolĉamar! Mi aprezas, ke mi povis aŭdi ilin :-). Vespere mi estis longe, longe kun Elina...

La duan de januaro, kio okazis? **Katastrofo** - ĉar mi jam ne memoras, kio okazis... Sed mi pensas, ke mi certe almenaŭ iris en vendejon aĉeti ion por manĝi por vojaĝo hejmen. Kaj post la reveno de vendejo mi partoprenis la prelegon pri elfa lingvo...

Poste mi ankoraŭ partoprenis prelegon, aŭ, ni diru, prezentadon de Kekso renkontiĝo por junaj geesperantistoj en Germanujo, sed kien ankaŭ eksterlandanoj estas invitataj. La celo estas



Internacia Kulinara Festivalo

konatigi novulojn kun Esperanto, kaj plej grava programo estas ludoj kaj dolĉaĵ-manĝado pro tio oni ofertis keksojn ĉe dum tiu prelego.

Vespere mi partoprenis la Internacian vesperon, sed ĉefe mi adiaŭis kun Elina, ve... La reston de la nokto mi uzis por spektado de fotoj de Ukrainujo kaj de Krimeo kun la junulino de Krimeo. Ŝi devis studi, kiam ni estis en Jalto, sed kompreneble rekonis sur la fotoj la lokajn geesperantistojn. Mi ricevis monon pro la prelego pri Ĉernobilo, aĉetis lumdiskon de la Pafklik, ludis homlupojn, diskutis kun Vlado kaj lia nova koramikino...

Forveturo

Sed mi ja ne povis resti veka dum la tuta nokto, ĉar mi, Bára kaj Standa planis forveturi jam je la sepa horo kaj duono matene (Marek celis forveturi al Belgujo). Je la kvara matene mi adiaŭis tiujn gepartoprenantojn, kiuj ankoraŭ ne estis dormantaj, kaj iris dormi por 2 horoj. Ĉio en mia ĉambro estis preta, por ke mi post la sesa horo denove vekiĝu kaj eliru al la trajnhaltejo. Ĉar ni volis uzi denove la grupbileton, ni interkonsentis kun Martin de Germanujo (tiu kiu vojaĝis kun ni jam al la IS) kaj Miranda de Aŭstralio, ke ni veturos komune per la bileto por 5 homoj, tiel ke la prezo por persono ne estu tiom alta.

Per loka trajno ni veturis al Marburg, kaj poste jam en pli bela trajno al Frankfurt am Main, kie ni adiaŭis aliajn esperantistajn kunvojaĝantojn kaj ĉefe Mirandan. De Frankfurt ni jam estis nur kvar kun Martin. Kun ŝanĝo en Würzburg ni veturis komune al Nürnberg, dormetis, diskutetis...

En Nürnberg ni havis unu horon, do Martin, kiel lokulo decidis, ke ni povos promeni iomete en la urbo. Ni vidis iom de ĝia historia urbocentro kaj unu preĝejon... Ni eĉ uzis la metroon. Martin demandis min: En kiuj trajnoj validas la bileto? Mi respondis, ke interalie en S-bahn (loka rapidtrajno ĉe urboj), kaj Martin diris, ke U-bahn (metroo) estas kiel S-bahn. Do ni eniris la stacion de metroo, por ke ni ne iru piede al stacidomo denove. Tial la reveno estis por mi denove interesa :-). Ĉe la trajno direkte al Ĉeĥujo ni ankoraŭ fotis nin komune kaj poste enrajniĝis jam sen

Martin... Ankoraŭ kelkaj horoj kaj ni estos en Ĉeĥujo...

Reveno en Ĉeĥujon

Malfrue posttagmeze ni finfine venis en la stacion Furth im Wald, de kie ni jam havas ĉeĥajn biletojn. Ĉar ni havis ankoraŭ tempon, ni eliris en la urbocentron kaj promenis interese: urbeto, sed somere dum tago ĝi certe estas pli viva.

Je la sepa horo vespere ni forveturas jam per ĉeĥa kaj do ne plu tiom pura kaj komforta trajno al Pilseno, de tie poste jam per rapidtrajno al Prago. Antaŭ la deka horo ni finfine estas en Prago. Post tranokto ce Bára apud Prago, mi forveturis per rapidtrajno al Brno, kie atendis min gepatroj, hamstroj, hundo kaj lernado... Jes, lernado... Lunde mi jam iris denove en la lernejon...

Epilogo

*ISooooooooooooooooo,
ni amas vin en IS.....
La kor' en IS
Ĝi batas por ni*

Impresoj:

Nur pozitivaj! La unuan fojon vere en Germanujo, la unuan kaj samtempe la lastan fojon en IS...
Aprezi devas mi ankaŭ la bongustan manĝservon :-)
Senpagan saŭnon...
Multe da ludoj
Koncerton de Dolĉamar
Ĉu vere katastrofoj? Tute ne...

Miroslav HRU`KA, Ĉeĥujo

Julio

Junio 29 – Julio 17: Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) en la Universitato de Kalifornio en San-Diego, Usono. Trisemajna studprogramo kiu emfazas aktivan uzadon de Esperanto en interkulturaj komunikado, kompreno, kaj kunlaboro. Rete: esperanto.org/nask

2-5: 68-a Hispana Kongreso de Esperanto en Malago, Hispanujo. Samtempe kaj samloke okazas la 14-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Rete: tinyurl.com/malago

4-9: Arto-ŝoko. Intensa Esperanto-kurso surbaze de la vivo kaj arto de Vincent van Gogh apud Le Touquet, Francujo. Rete: edukado.net/kursoj/21799

7-12: 9-a Kultura Esperanto-Festivalo (KEF) en Helsingør, Danujo. Venas multaj Esperanto-muzikistoj. Rete: kef.saluton.dk

10-18: Somera Esperanto-Studado 2009 (SES) en Modra-Harmónia apud Bratislavo, Slovakujo. Dua fizika lernu!-renkontiĝo. Instruado de Esperanto, ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj, koncertoj, filmo-spektado, diskejo. Rete: lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES

12-17: 44-a Brazilia Kongreso de Esperanto kaj la 29-a Brazilia Esperantista Junulara en Juiz de Fora, Brazilo. Temo: “Esperanto kaj Junularo: Bazoj por la estonteco”. Rete: tinyurl.com/brazilo

18-25: 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Liberec, Ĉeĥujo. Temo: Liberec'. Kongreso de TEJO kaj plej granda junulara Esperanto-aranĝo. Rete: tejo.org/ijk

Julio 25 – Aŭgusto 1: 94-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Bjali-stoko, Polujo. Samtempe okazas la 40-a Internacia Infana-junula Kongreseto en la apuda Supraśl. Rete: 94uk.bialystok.pl kaj bertosch.free.fr/iik2009

Aŭgusto

2-8: 11-a MIRO (Mojosa Esperanto-Renkontiĝo) en Ĉakovec, Kroatujo. Internacia renkontiĝo organizata de la Kroatuja Esperanto-Junularo. Rete: keja.hr/miro_e.html

8-15: FESTO 2009 en Zwingenberg apud Frankfurto, Germanujo. Ĉi tiu renkontiĝo kutime okazas en Francujo, sed ĉi-foje estas organizata de ambaŭlandaj Esperanto-Junularoj en Germanujo. Rete: <http://tinyurl.com/festo2009>

Septembro – Januaro

Septembro 27 – Oktobro 6: 14-a Internacia arta Esperanto-festivalo Velura Sezono en Jalta, Ukrainujo. Rete: litlurl.net/velura

Oktobro 10-12: 16-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto en Silver Bay, Usono. Rete: esperanto.qc.ca/eo/are

**Plena kalendaro de Esperanto-eventoj: eventoj.hu/kalendar.htm
Kalendaro, al kiu ĉiu povas mem aldoni Esperanto-aranĝojn: mondakalendaro.org**

Oktobro 10-12: 96-a Japana Esperanto-Kongreso en Kôhu, Yamanasi, Japanujo. Temo: "Esperanto, Tergloba lingvo de la 21a jarcento — 150a datreveno de Zamenhof". Rete: tinyurl.com/japanujo

Decembro 27 – Januaro 3: 1-a Junulara E-Semajno (JES) en Zakopane, Polujo. Ĉi tiu renkontiĝo kunigas la IS-on kaj la AS-on, kaj do estos organizata de la Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj kune. Rete: jes.pej.pl

Esperantokursoj en Rumonge, Burundo

La 10-an de januaro, vizitis Burundon Johano Hendrekus DERKS el Nederlando kaj Svetlana MILANOVIC el Serbujo por gvidi esperantan kurson en ĉi tiu parto de la mezorienta Afriko.

La instruado devis okazi en Goma (en la najbara lando) sed pro la malsekureco tie, ili ŝanĝis sian programon kaj interkonsentis kun burundaj esperantistoj por okazigi la kurson en Burundo. Ili jam aĉetis flugbiletojn ĝis Ugando kaj kiam ili subite ŝanĝis programon kaj translokiĝis la instruadon al najbara lando, ili venis al Burundo, kio ne estis facila por ili. Ili havis problemon survoje, ĉar ili devis ŝanĝi busojn multfoje kaj alvenis en Bujumbura la 10-an anstataŭ la 9-an.

Laŭ la programo, la du gastoj devis alveni en Burundo la 9-an de januaro, kaj resti en Bujumbura unu semajnon gvidante esperantokurson ĉe la bahaa centro kaj vizitante diversajn esperantajn lernejarajn klubojn en Bujumbura.

La saman tagon alvenis du esperantistoj (Emmanuel kaj Radjabu, organizintoj de la neokazinta seminario de Kongo) el nia najbara lando Kongo por sekvi la kurson gvidotan de Johano kaj Svetlana ĉar ne eblis ke ĉi tiu kurso okazu en Kongo pro la malsekureco en Goma.

Okazis vizito al la vigla klubo de la lernejo LMB (Lycée Municipal de

Buyenzi) sabaton, la 10-an de januaro (posttagmeze). Johano prelegis france ĉar inter la partoprenintoj estis ne-esperantistoj, sed la etoso estis ege bona. Je la fino, ni piediris tra la urbo ĝis la hotelo, kiu gastigis la vizitantojn.

Dimanĉon posttagmeze Johano donis intervjuon al ĵurnalisto de la kultura radio (kiu ankaŭ sekvis dum kelkaj horoj kurson de Esperanto gviditan de Svetlana), kaj poste ni kuniris kun la ĵurnalisto ĉe E.N (Normala lernejo) Ngagara kie sesdeko da lernantoj soife atendis nin.

Tie, okazis prelegoj fare de Johano; partoprenintoj demandis multon pri Esperanto, ĝia celo, avatangō ktp. La ĵur-



Esperanto-kurso por komencantoj

nalisto surbendigis parton de la prelego (kaj demandojn kaj respondojn) kaj elsendis la programeron merkrede kaj vendrede.

Poste demandaro okazis enkonduko pri la Esperanta gramatiko, parto kiu interigis multajn novajn ĉeestintojn. Je la fino, okazis komuna foto kun ĉiuj ĉeestintoj.

London estis planite ke ili gvidos kurson ĉe la bahaa centro sed ĉi tiu kurso ne okazis pro la fakto ke respondeculoj de la centro malfrue venis por preni ilin. Johano kaj Svetlana decidis viziti la bestogardenon en Bujumbura.

Johano kaj Svetlana havis apartan kurson kun Emmanuel kaj Radjabu el najbara lando, kiuj venis nur por la seminario kaj finis kurson kun ili marde.

Ni marde iris al Rumonge, 72 kilometrojn de la ĉefurbo, kie multaj esperantistoj atendis ilin. Merkrede la 14-an de januaro, esperantistoj de Rumonge jam estis informitaj pri la alveno de Svetlana kaj Johano. Okazis kunveno, kies celo estis unue bonvenigi la du gastojn en Rumonge kaj due starigi programon pri la kursoj.

Laŭ la plano, la seminarion devis partopreni 60 personoj: 20 komencantoj, 20 progresantoj kaj 20 instrukapablantoj, sed pro la interesiĝo de multaj personoj, la antaŭvidita nombro duobliĝis.

Partoprenis entute 120 personoj: 80 komencantoj kaj 40 progresantoj kaj instrukapablantoj.

Pro la alta nombro de partoprenantoj precipe en la komencanta grupo, organiz-



Disdonado de atestiloj

intoj decidis partigi ilin en du grupoj, kiuj alterne lernis.

En Rumonge, Johano, Leopold, Pamphile, Asani kaj Svetlana vizitis mezgradan lernejon kie estas starigita Esperanto-klubo, en Gasanda, vilaĝo je 30 km de Rumonge. Tie, ĉirkaŭ 80 junuloj atendis ilin kaj ĝojegis ricevi tiun altgradan delegacion. Johano donacis al ili piedpilkon, kiu ebligis al ili renkontiĝi ludante pilkon kaj samtempe parolante Esperanton, ĉar en Burundo ne oftas Esperantaj aranĝoj aŭ renkontiĝoj. Certe, per la piedpilkado, ili sukcesos uzi la lingvon kaj eĉ reklami ĝin.

Sabate la 30-an okazis ekzameno por instrukapablantoj kaj progresantoj. La instruado okazis ekde la 15-a ĝis la 31-a de januaro kaj je la lasta tago ni disdonis atestilojn al komencantoj. Al la alia grupo Johano sendos diplomojn kiam li estos en Nederlando.

SABIYUMVA Jérémie, Burundo

Pri Pasporta Servo

La suba teksto venas el retmesaĝo, kiun la nova administranto de Pasporta Servo, Joop Kieffe, kaj la TEJO-prezidanto, Gregor Hinker, dissendis al uzantoj kaj gastigantoj de Pasporta Servo.

La gravaj demandoj

- *Kial oni renovigas Pasportan Servon?*

Pasporta Servo (PS) estas bonega kaj dum la pasintaj jaroj bone funkciis kiel papera libreto. Sed por ke bonega ideo kiel tiu ĉi plue estu sukcesa, ĝi bezonas daŭre esti „reinventita“. Tial, TEJO decidis renovigi ĝin kaj eluzi la eblojn de la interreto por igi ĝin pli simpla, pli efika kaj pli bona ilo por internaciaj Esperantistaj vojaĝantoj. Kompili la ĉiujaran eldonon de PS estas grandega tasko kiun dum 13 jaroj plenumis Derk EDERVEEN. Dank' al la nova reta sistemo, tiu tasko pli facilos kaj estos dividebla je pluraj personoj.

- *Kiel statas la laboroj?*

Jam de pluraj monatoj skipo – programisto Joan CATALÀ el Katalunujo kaj Joop KIEFFE el Nederlando – laboras pri la nova reta sistemo. Ni taksas ke tre baldaŭ pretos la aliĝfunkcioj (vidu sube). Bedaŭrinde nia origina temposkemo iom prokrastiĝis, sed ni optimismas ke ĝis majo ni sukcesos prezenti la novan PS-n.

- *Kio ŝanĝiĝos?*

La nova retpaĝo *pasportaservo.net* ofertas multajn eblojn kiuj ĝis nun ne estis: rekta aliĝo en la retejo, rapida ŝanĝo de informoj, kontaktiĝo per la retpaĝo, retaj mapoj kaj multaj aliaj. Tamen pluaperos la papera eldono kiel ĝis nun, kvankam en iom alia aspekto.

PS kaj la reto

- *Kiam pretos la nova retejo?*

Ni atendas la eblon rete aliĝi jam la 23an de marto, kaj la solenan malfermon de la retejo la 7an de majo.

- *Kiel oni aliĝos per la interreto?*

Per simpla aliĝformularo en la retejo. Oni entajpos siajn informojn kaj povos tuj ilin kontroli kaj ŝanĝi laŭbezzone.

- *Kiel oni realiĝos?*

Ni sendos peton realiĝi laŭ via ĝisnuna aliĝstato: Se ĝis nun vi realiĝis per retroŝto, ni per retroŝto petos vin realiĝi rete. Se ĝis nun vi uzis paperan realiĝilon, vi pluricevos ĝin. Tamen, ni invitas vin uzi la reton se vi povas, eĉ se ĝis nun vi uzis paperan realiĝilon.

- *Ĉu mi pluricevos mian senpagan paperan ekzempleron?*

Kiel gastiganto vi plu rajtos je senpaga papera ekzemplero; kiel ĝis nun ni invitas ĉiujn libervole kontribui al la presokostoj. Ni scias ke pasintjare pluraj PS-anoj pro poŝtsendoproblemoj ne ricevis siajn ekzemplerojn malgraŭ ke ili rajtis kaj eĉ donacis. Kompreneble vi laŭdezire ricevos vian ekzempleron ĉijare.

PS ekster la reto

- *Ĉu pluekzistos papera ekzemplero? Kiel ekhavi ĝin?*

Jes, pluekzistos papera ekzemplero kaj ĝi estos havebla laŭ la kutimaj kanaloj. Ĝi estas mendebla ĉe UEA kaj aliaj Esperantaj librovendejoj.

- *Kiam aperos la ekzemplero?*

Ĝi aperos post la prezento de la retejo, do la 8an de majo.

- *Ĉu mi jam nun povas mendi la ekzempleron?*

La papera PS-libreto estos mendebla en la libroservo kaj dissendota ekde la 8a de majo.

Nord-Amerika Somera Kursaro festos sian 40an jaron!

29 junio – 17 julio, 2009

San Diego, Kalifornio, Usono

NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, festos sian 40an jaron ĉi-somere en bela apudmara San Diego, Kalifornio, en Usono, de la 29a de Junio al la 17a de Julio 2009. NASK daŭrigas sian tradician rolon kiel grava centro de plurnivela lernado kaj internacia uzado de Esperanto, ĉi-foje en la sino de la mondfama Universitato de Kalifornio en San Diego.

NASK 2009 konsistos el tri kursoj:

- Spomenka STIMEC, unu el la plej elstaraj vivantaj verkistoj en Esperanto, gvidos seminarion pri diverskultura literaturo.

- Paŭl GUBBINS, eminenta dramaturgo kaj ĵurnalisto, instruos meznivelan kurson.

- Lee MILLER, konata usona pedagogo, instruos postbazan kurson.

Grant GOODALL, direktoro de la lingva fako de la universitato, estros la kursaron.

La kursoj mem estas nur unu flanko de NASK 2009. Por kunc celebri la datrevenon venos pluraj gastprelegantoj. Ĝis nun konfirmitaj estas Humphrey

TONKIN kaj Mark FETTES; aliajn oni baldaŭ anoncos. Estos ankaŭ videaj konversacioj kaj intervjuoj kun instruistoj kaj lernantoj el antaŭaj jaroj kaj el diversaj landoj.

NASK estas unika evento en Esperantujo pro almenaŭ du kialoj. Unue, ĝi proponas oficialajn universitatajn kursojn kiuj estas tamen malfermitaj al la tutmonda esperantistaro, sendepende de antaŭa universitata studo. Due, ĝi proponas tri-semajnan loĝadon en plene Esperanta medio. Ĉiuj partoprenantoj loĝas kune en bela kaj moderne ekipita loĝejo, kie ĉiutage estas diversaj eventoj, kaj distraj kaj klerigaj.

Por eksterlandanoj, 2009 estas aparte interesa jaro por viziti Usonon. Ĝus okazis historia politika ŝanĝo, kaj multaj usonanoj sentas novan amikemon, scivolemon kaj malfermitecon rilate al la cetera mondo, kaj deziron forviŝi la militeman sintenon de la pasintaj jaroj. Vizitantoj povos mem sperti la grandan optimismon kiu nun regas inter multaj kaj diskuti kiel oni konstruu novan Usonon surbaze de la nuntempa realo.

Esploru nian novan retejon: esperanto.org/nask

Por informoj pri aliĝo, stipendioj, ktp: Ellen EDDY eddyellen@aol.com

Por informoj pri la universitato, stato de Esperanto en ĝi, ktp: Grant GOODALL ggoodall@ucsd.edu

Pri la historio de NASK: NASK komenciĝis en 1970 kiam Cathy SCHULZE invitis William AULD instrui en San Francisko. Multaj aliaj eminentaj esper-antistoj instruis en postaj jaroj, kaj NASK komencis ludi tre gravan rolon en la trejnado kaj edukado de novaj generacioj de Esperanto-aktivuloj.